


Demandoj neniam starigitaj al Tony Blair kaj al... Saddam Hussein

Dosiero farito de Transnacia Transpartia Neperforta Radikala Partio



www.radicalparty.org

Esperantigo de

 **NITOB**E

www.nitobe.it

Pere de:

Francesca Iomello

Sara Spanò

Piermichele Giordano

Luigia Oberrauch Madella

Vittorio Madella

Diego Fiumarella

Giancarlo Fighiera

Fabrizio Pennacchietti

Pedro Aguilar Sola'

Fabio Bettani

Ian Fantom

Enhavo

Enkonduko	p. 3
La protokolo de <i>Crawford</i> , Teksaso, la 22a februaro 2003a	p. 7
Memorando de <i>David Manning</i> de la 23a Julio 2002a	p. 13
Artikolo el <i>New York Times</i> de la 31a Januaro 2003a	p. 16
Artikoloj de la kunveno de la 1a Marto de la Araba Ligo	p. 21
Eltiraĵoj de la intervjuo de <i>ABC</i> al <i>Colin Powell</i>	p. 29
Opinisondo de la <i>BBC</i>	p. 30

Enkonduko

La sabotado de la iniciato "Irako libera, sola alternativa elekto al milito"

Kiam en la silento de la amaskomunikiloj kaj kontraŭ la majoritato de la itala Parlamento, la Registaro malpermesis la afirmon de la radikala projekto por la ekzilo.

En **Januaro 2003** la Senperforta Radikala Partio Transnacia kaj Transpartia provis konvinki la italan, eŭropan kaj mondan publikan opinion, ke en Irako kaj por Irako, tiel ankaŭ por la tuta Mezoriento kaj la libera mondo, la vera kaj daŭra alternativo, ne estis "milito aŭ paco," sed "milito aŭ libereco, la leĝo, la demokratio kaj la paco."

Ĝi sin turnis do al la internacia komunumo, al la Unuiĝintaj Nacioj, al la Itala Parlamento antaŭ ĉio, por ke ili faru, tuj, siajn proprajn asertojn laŭ kiuj la ekzilo de la diktatoro 'Saddam Hussein' estu foriginta, por Usono mem, la neceson de milito, estiĝante la deirpunkto por la politika solvo de la Iraka problemo.

Alia celo de la radikala projekto estis postsekvigi al la jardekoj de la reĝimo konfidan Internacian Administracion (demokratana registaron), komisiante al iu tre elstara ŝtatestro la taskon prepari, ene de du jaroj, la kondiĉojn por plena ekzerco de la rajtoj kaj liberecoj por ĉiuj irakanoj, viroj kaj virinoj, kiel deklaras la Ĉarto de la fundamentaj Rajtoj de la Unuiĝintaj Nacioj.

Ene de unu monato la apelacio estis subskribita de 26.506 civitanoj el 171 landoj, de 46 membroj de la Eŭropa Parlamento kaj en Italio de 501 parlamentanoj kiuj korespondis al 53,5% de la Ĉambroj¹.

La **8-an de februaro 2003** la Itala Ĉefministro Berlusconi sendis gravan, longan kaj kompleksan memorandon al Gaddafi, en kiu alprenas formon la eblaj scenaroj de akordo kun Saddam por ebligi la forlason de la povo kaj la eniron en ekzilon pere de maksimume ebla sekureco kaj garantio ne nur por la diktatoro sed ankaŭ por ties ebla akompanantaro, dank'al difinendaj sekurekrimoj². Post malmultaj tagoj Berlusconi povas informi Bush ke la respondo de Gaddafi estas pozitiva.

La **19-an de februaro 2003** la itala Parlamento kun la subteno de la Registaro voĉdonas la proponon Radikalan (345 jes, 38 ne, 52 sindetenoj) kio devigas la

¹ Apelacio havebla en reto ĉe: http://old.radicalparty.org/iraq_appeal/signatories/signatories.php

² Artikolo de Igor Mann en La Stampa de la 7-a de februaro 2003. Havebla en reto ĉe: <http://www.radicalparty.org/it/content/notizia-del-memorandum-riservato-trasmesso-da-berlusconitripoli-gheddafi-sulla-proposta-di>

Registaron Berlusconi “subteni ĉe ĉiuj internaciaj organizoj kaj precipe ĉe la Sekureca Konsilio de la Unuiĝintaj Nacioj la hipotezon de iu ekzilo por la iraka diktatoro kaj sur bazo de la povoj donitaj al li fare de la Ĉarto de UNO por la starigo de provizora Registaro kontrolota kiu restarigu post mallonga tempo la plenan ekzercon de fundamentaj liberecoj por ĉiuj irakanoj³”.

En la debato, Prezidanto Berlusconi asertas ke la itala Registaro “estas faranta ĝin en rezerviĝema maniero - kiu estas devigo - ne nur kun araba lando, kiu proponis sin mediacii, sed ankaŭ kun malsamaj landoj, konstante informante la usonan Administracion kaj la laŭvican Prezidanton de la EU-Konsilio Kostas Simitis⁴”.

Interkonsente kun Bush, Berlusconi post kelkaj tagoj akiras de Gaddafi la informon ke Saddam estas jam decidinta transiri al la efektivigo de la demisio kaj de la ekzilo.

El la kolokvo de la **22-a de februaro 2003** en Crawford, Teksaso, inter Bush kaj Aznar, pere de telefona konekto kun Blair kaj Berlusconi, malsekretigita kolokvo por la hispana ambasadoro Javier Rupérez (kaj aperigita la 26-an de septembro 2007 en El País) evidentiĝas unuflanke la evidenta klopodo de Ĉefministro Aznar aŭspicii de Prezidento Bush pluan singardemon. Bush, je tiu ĉi punkto komunikas al li esti ricevinta de Berlusconi la pozitivan respondon de Gaddafi, kiu koncernas la akcepton de la ekzilo fare de Saddam.

Malgraŭ tio Bush montriĝas malinklina akcepti ion ajn interkonsenton kun la iraka diktatoro juĝante "senespera" la kondiĉon de Saddam kaj kiu “povus esti mortigota ene de du monatoj.” Li akuzas Saddam, nomitan "ŝtelisto, teroristo, militkrimulo, kompare al kiu Milosevic estus Patrino Teresa", kaj li postulas “unu miliardon da dolaroj” kaj “ĉiujn informojn kiujn li deziras pri la amasdetruiloj.” Je ĉi tiu punkto Blair petas Bush prokrasti la komencon de militaj operacoj je dek tagoj kompare al la elektita dato de la 10-a de Marto. Bush estas nefleksebla: li postulas la militon.

Ĉi tiuj ĉi asertoj, neniam malkonfirmitaj, igas tute klaraj la poziciojn surkampe. Saddam ne estas nemovebla, Saddam deziras foriri.

³ Rezolucio n.1-00161 de la seanco n.268 de 19/2/2003. Havebla en reto ĉe:
http://legxiv.camera.it/_dati/leg14/lavori/stenografici/sed268/btind.htm#1-00161

⁴ Stenografia raporto pri la seanco n. 268 de 19/2/2003. Havebla en reto ĉe:
http://documenti.camera.it/_dati/leg14/lavori/stenografici/sed268/s280r.htm

En eksterordinara, kaj ŝajne hazarda kombinaĵo, la Radikala kampanjo daŭras. La **23-an de februaro 2003** Pannella fakte, post dudek kvar horojn ekde la renkontiĝo de Crawford, avertas la italan registaron, la EU kaj Blair kontraŭ doni fidon kiel pacperanto al Gaddafi kaj pro tio ĉi rilate la respondoj estas konkludigaj.

La malfidindeco de la libia gvidanto konfirmiĝas la **1-an de Marto 2003**, dum la pintokonferenco de la Araba Ligo en Sharm el-Sheik, Egiptujo por formale diskuti la opcion de ekzilo por Saddam Hussein. Laŭ kelkaj atestantoj, inter kiuj estis Emma Bonino, Gaddafi sukcesis pere de absolute unika kaj talenta maniero malhelpi, ke la Araba Ligo pridiskutu la ekzilon proponitan de Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj (UAE), Barejno, Kuvajto, Kataro, SaŭdArabujo kaj Jordanio. Dum tiu ĉi seanco la Prezidanto de la Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj Zayed al-Nahyan estis preta anonci ke, post kvar personaj renkontiĝoj fare de liaj reprezentantoj kun Saddam Hussein en Bagdado, la iraka diktatoro, por oficiale komunikis sian decidon plene akcepti la ekzilon, metis kiel solan kondiĉon, ke la propono kaj la invito estu oficiale liverataj al li dum la seanco de la Araba Ligo kaj “ne de la Usonanoj”.

Fine de la kunsido, la UAE Ministro pri Informoj deklaras ke la iniciato farita de lia lando por ŝanĝiĝo de la reĝimo paca en Irako rievigis ankaŭ la subtenon de SaŭdArabujo kaj de Kuvajto: “Je la fino de la kunsido ni ricevis la subtenon de aliaj landoj, kiuj bedaŭrinde malakceptas trakti la aferon publike. Ĉiuj arabaj ŝtatoj konsentas ke Saddam devas lasi, sed neniu havas la kuraĝon diri tion publike”.

La **6-an de marto 2003** oficialaj arabaj fontoj raportas ke “la Ministroj de Eksterlandaj Aferoj de Egiptujo, Libano, Tunizio kaj Sirio anoncas mision al Bagdado peti Saddamon forlasi la landon kaj tiel eviti la militon”. Samtempe, intervenante ĉe la ĝenerala Asembleo de UNO, la Pakistana Ambasadoro Munir Akram asertas, ke Saddam kondiĉas la trairon al la demisio kaj al la ekzilo al la garantio por sia imuneco je ĉiu posta akuzo pro militkrimoj. Precipe “imuneco kaj ne senpuneco”, estis la preskaŭ obseda ripetado de Pannella dum la kampanjo.

Nur en tiu ĉi momento oni permesas al Marko Pannella aliri kaj paroli pri la ekzilpropono al Saddam en iu elsendo pere de la naciaj italaj retoj dum la unuaj vesperaj horoj.

Ni estas je la antaŭtago de la milito. La **18-an de marto 2003** Bush donas al Saddam ultimaton: li havas 48 horojn por forlasi la landon con sia familianoj kaj eviti la militon. Per tiu ĉi modo li devigas Saddam trovi sin en la situacio priskribita la 22-an de februaro en Crawford. Por Saddam estas neeble organizi la fuĝon en kiu estas neniu objektiva ebleco havigi al si la vivon sava.

La **19-an de marto 2003** oni interkonsentas informi la usanan kaj mondan publikan opinion pri opiniondo de la 25-a de januaro 2003: la plimulto de la Usonanoj (62%) afirmas interkonsenti ke Saddam vivu en ekzilo por la resto de sia vivo kaj povu eviti ĉiuajnajn persekutojn kauze de ĉiuj ajn agoj faritaj kiel gvidanto de Irako, kondiĉe ke li akceptu forlasi la povon per paca maniero kaj ke la milito estu evitota.

Dum la tuta nokto de vendredo la **21-a de marto** pere de Radikala Radio Pannella petegis, preĝpetis, sendi ankaŭ en la semajnfino kun ekstrema urĝeco la italan ambasadoron al Mubarak. La sekvan dimanĉon alvenis la novaĵo ke la angla ambasadoro, portanto de grava mesaĝo, estis petinta kaj estis ricevinta renkontiĝon kun la Prezidanto Mubarak. Tamen ne plu eblis ŝanĝi: estis tro malfrue.

La itala Registaro, forta pro la parlamenta plimulto, havis la devon investi la tutan internacian komunumon por alveni al propono de ekzilo larĝe kunpartigita. Ĝi elektas kontraŭe ne kuntreni eĉ la komunumajn instituciojn kaj precipe la du CAGRE (La Konsilon pri Ĝeneralaj Aferoj kaj Eksteraj Rilatoj) okazintaj la 24/02/2003 kaj la 18/03/2003, do post la voĉdono de la Parlamento, dum kiu la itala reprezentanto ne igas mencii la proponon.

LA PROTOKOLO DE CRAWFORD

Transskribo publikigita de *El País* la 26an de septembro 2007a

La jeno estas transskribo de konversacio okazinta inter Prezidento George W. Bush kaj la Ĉefministro Josè Maria Aznar en Crawford, Teksaso, la 22an de februaro 2003a. La teksto estas adapto de la originala hispanlingva teksto verkita de Alvaro Degive-Màs danke al Scott Staton. Ĝi aperis sur El País la 26an de septembro 2007a.

Prezidento Bush: «Ni favoras la okazigon de dua rezolucio de la Sekureca Konsilio kaj volus ke ĝi okazu plej baldaŭ. Ni volus anonci ĝian okazigon jam lundon aŭ mardon» [24an aŭ 25an de februaro 2003a, ndr].

Ĉefministro Aznar: «Pli oportune mardon, post la kunveno de la Eŭropunia Konsilio por Ĝeneralaj Aferoj. Gravas pluteni la elanon por la rezolucio kiun ni ekhavis de la pinta kunveno de Eŭropa Unio (en Bruselo, lundon la 17an de februaro, ndr). Estas preferinde atendi ĝis mardo».

Bush: «Ĉi povus okazi lundon posttagmeze, se oni priatentas la horzonon. Ĉiuokaze ene de la venonta semajno. Ni celu al skribita rezolucio kiu nek entenu devontigajn elementojn, nek menciu la uzon de forto, sed konstatu ke Saddam Hussein ne kapablis plenumi siajn sindevigojn. Tian rezolucion multaj konsilianoj povos aprobi voĉdone, same kiel en la kazo de la rezolucio aprobita por Kosovo [la 10an de junio 1999a]».

Aznar: «Ĉu oni ĝin prezentu antaŭ la Sekureca Konsilio unuavice kaj sendepende de paralela deklaro? »

Condoleeza Rice: «Fakte ne devus okazi paralelaj deklaroj. Ni planas plej eble simplan rezolucion, sen tiom da detaloj pri ties plenumiĝo, kiujn Saddam povos komence profiti kiel etapojn kaj poste tute ne plenumi. Ni jam interparolas kun Blix [la inspektorestro de UNO, ndr] kaj kun aliaj membroj de lia teamo por akiri utilajn ideojn por tiamaniere proponi la rezolucion al la Ĝenerala Asembleo».

“Forliberiĝi de li”

Bush: “Saddam ne ŝanĝiĝos, sed pluludos. Alvenis la momento liberiĝi je li. Ĝuste tiel. Miaflanke, mi kopodos uzi kiel eble plej fajnman retorikon, dum mi strebas aprobigi la

rezolucio. Se iu vetoos (Ruslando, Ĉinio kaj Francio, apud Usono kaj Unuiĝinta Regno, havas vetoo-raĵton en la Sekureca Konsilio, ndr), ni tamen plu antaŭeniros. Saddam ne malarmiĝas. Ni devas trafi lin nun. Ĝis nun ni montris nekredblan paciencon. Restas du semajnoj. Tiam ni estos milite pretaj. Mi kredas, ke ni sukcesos pri la dua rezolucio. En la Sekureca Konsilio ni havas la tri afrikanojn (Kamerumo, Angolo kaj Gvideo ndr), aldone al la ĉilianoj, al la meksikanoj. Mi parolos kun ili kaj kun Putin, kompreneble. Ni eniros en Bagdadon martofine. Ekzistas 15%aj ŝancoj, ke ĝis tiam Saddam mortos aŭ forfuĝos. Tamen, tiuj ŝancoj ne ekzistos ĝis ni elmontrons nian firman volon. La egiptanoj estas interparolantaj kun Saddam Hussein. ŝajnas, ke li sciigis, ke li pretas ekziliĝi, se oni permesos al li kunporti unu miliardon da dolaroj kaj ĉiujn deziratajn informojn pri la amasdetruaj armiloj. (Muamman) Gheddafi diris al Berlusconi, ke Saddam volas foriri. Mubarak diras al ni, ke en la tiaj cirkonstancoj tre eblas, ke oni murdos lin.

Ni ŝatus agi laŭ mandato de la Unuiĝintaj Nacioj. Se ni agos milite, ni faros tion kun granda precizeco, fokusante niajn objektivajn. Ni falĉos la trupojn fidelajn al Saddam kaj la regula armeo rapide komprenos kio okazas. Ni havigis klaran mesaĝon al la generaloj de Saddam Hussein: ni traktos ilin kiel milit-krimulojn. Ni scias, ke ili akumulis grandegajn kvantojn da dinamito por eksplodigi la infrastrukturojn kaj la petrol-putojn. Ni antaŭvidis okupi tiujn putojn tre rapide. Ankaŭ la saŭdianoj helpos nin, surmerkatingante la necesan petrolon. Ni estas ellaborantaj konsiderindan pakaĵon da humanecaj helpoj. Ni povas venki sen detruoj. Ni jam antaŭprojektas la PostSadaman Irakon; mi kredas ke ekzistas bonaj bazoj por pli bona estonto. Irako disponas pri taŭga burokrata strukturo kaj pri relative forta civila socio. Ĝi povus organiziĝi kiel federacio. Intertempe, ni faras ĉion eblan por kontentigi la politikajn postulojn de niaj amikoj kaj aliancanoj.

Aznar: Gravas kalkuli je rezolucio. Ne estus same agi sen rezolucio. Estus oportune havi la plejmulton en la Sekureca Konsilio pri la dua rezolucio. Tio pli gravus ol vetoo. Ni opinias, ke la enhavo de la rezolucio devus konstati, inter alie, ke Saddam malŝparis sian ŝancon.

Bush: Jes, certe. Estus pli bone tiel ol referenci al la “necesaj rimedoj” (Li referencas al la tipa rezolucio de UN, kiu rajtigas uzi “ĉiujn necesajn rimedojn)

Aznar: “Saddam Hussein ne kunlaboris, li tute ne senarmiĝis, ni devus listigi ĉiujn

liajn neplenumojn kaj lanĉi pli detalan mesaĝon. Tio ĉi permesos, ekzemple, al Meksiko elpaŝi.” (Aznar aludas al la sinten-ŝanĝo de Meksiko, kiu kontraŭis la duan rezolucion; pri tio ĉi Prezidanto Vicente Fox persone informis Aznar dum ties vizito al Meksikurbo la 21-an de februaro, ndr).

Bush: “Oni redaktos la rezolucion celante iel helpi vin; ĝia enhavo tute ne gravas por mi.”

Aznar: “Ni havigos al vi kelkajn tekstojn.”

Bush: “Ni havas unu nuran celon: ke Saddam Hussein senarmiĝu. Ni ne povas permesi ke li prokrastu sian decidon ĝis la somero. Li jam disponis pri kvar monatoj, pli ol sufiĉa tempo por senarmiĝi.”

Aznar: “Rilate tian tekston ni povas prezentiĝi kiel kun-aŭtoroj kaj konvinki aliajn ŝtatojn sekvi nin.”

Bush: “Bonege!”

“Alvenis la momento por ekagi.”

Aznar: “La venontan merkredon (16a de februaro, ndr) mi renkontiĝos kun Chirac. Tiam, la rezolucio jam estos diskonigata.”

Bush: “Bonege. Chirac estas plene informita pri la reala situacio. La sekretaj servoj ĉion klarigis al li. Jam de kelka tempo la Araboj sendadas al Chirac tute klaran mesaĝon: *Saddam Hussein devas foriri*. La problemo estas ke Chirac opinias sin “Mister Arab”, dum, male, li terure komplikigas ilian vivon. Sed mi volas eviti antagonisman sintenon rilate al li. Ni ja havas malsamajn vidpunktojn, sed nenio plia devas estigi kontaŭstaron inter ni. Esprimu al li mian plej koran saluton. Tute sincere! Ju pli da kunsento li perceptos inter ni, des pli bone la tuta afero iros por ĉiuj.”

Aznar: “Kiel akordiĝos la rezolucio kun la raporto de la inspektistoj?”

Rice: “La 28an de februaro oni havos neniun raporton. Sian raporton la inspektistoj prezentos, skribe, la unuan de marto kaj ĝi alvenos al la Sekureca Konsilio, plej frue, post kvin aŭ ses tagoj. Ni antaŭvidas neniun gravan novaĵon en tiu raporto; mi antaŭsentas ke Blix havos pli kritikan sintenon ol antaŭe rilate la bonan volon de la irakanoj. Unu semajnon post la apero de la inspektistoj antaŭ la Konsilio, oni povas antaŭvidi la voĉdonadon pri la rezolucio. Intertempe, la irakanoj klopodos konvinki

ĉiujn pri tio, ke ili estas plenumantaj siajn devigojn. Kio tute ne veros kaj, ĉiukaze, ne sufiĉos, eĉ se ili deklaras ke ili detgruis kelkajn misilojn”

Bush: “Tio ĉi estas kiel la torturo konata kiel *ĉina gutado*. Ni nepre devas fini ĉi tiun blagadon.”

Aznar: “Mi plene konsentas, sed estus preferinde kalkuli pri kiel eble plej multe da homoj. Pacienca ankoraŭ iom da tempo.”

Bush: “Mia pacienco elĉerpiĝis. Mi atendos, maksimume, ĝis la dekkvina de marto”.

Aznar: “Mi ne celas ke vi paciencu senlime. Mi nur petas ke vi faru ĉion eblan por ke la eroj de la puzlo plene enŝoviĝu.”

Bush: “Landoj kiel Meksiko, Ĉilio, Angolo kaj Kameruno devas scii, ke Usono riskas sian sekurecon, kaj agi kun amikeca sento rilate al ni.

[La ĉilia prezidento Ricardo, ndlr] Lagos devas scii, ke la Akordo pri Libera Interŝanĝo kun Ĉilio estas konfirmota fare de la Senato, kaj ke negativa sinteno povus endanĝerigi ties ratifon. Angolo ricevas financan helpon de *Millennium Account*, kaj ankaŭ tiu povus esti kompromitota se ili ne montriĝos pozitivaj. Kaj Putin devas scii, ke per sia sinteno, li endanĝerigas la rilatojn inter Rusio kaj Usono”.

Aznar: “Tony [Blair, ndlr] ŝatus prokrasti ĝis la 14-a de marto”.

Bush: “Mi preferas la 10-an. Tio estas kiel la ludo de la bona kaj de la malbona policianoj. Mi fajfas pri tio, ke mi estas la malbona policano kaj Blair la bona”.

“Militkrimulo”

Aznar: Ĉu veras, ke ekzistas eblecoj, ke Saddam Hussein ekziliĝos?”

Bush: Jes, tiu ebleco ekzistas. Ankaŭ eblas, ke oni murdos lin”.

Aznar: “Ĉu ekzilo kun kelkaj garantioj?”.

Bush: "Neniu garantio. Li estas ŝtelisto, teroristo, militkrimulo. Kompare kun Saddam, Milosevic estus kvazaŭ Patrino Teresa. Kiam ni eniros, ni malkovros multajn aliajn krimojn kaj ni portos lin al Internacia Justica Kortumo de Hago. Saddam Hussein jam kredas ke li forsaviĝis. Li pensas ke Francio kaj Germanio haltigis la proceson pri liaj fiagoj. Li pensas ankaŭ ke la manifestacioj de la pasinta semajno (sabaton la 15an de februaro, ndr) ŝirmas lin. Kaj li kredas ke mi tre malfortiĝis. Sed la

homoj kiuj ĉirkaŭas lin scias ke la afero malsamas. Ili scias ke lia estonto estos ekzilo aŭ ĉerko. Tial estas gravege daŭrigi premon sur li. Gheddafi nerekte diras al ni ke tiu ĉi estas la nura maniero forigi lin. La nura strategio de Saddam Hussein estas malfruigi, malfruigi, malfruigi."

Aznar: "Vere, la plej grava sukceso estus gajni la matĉon) tute senpafe kaj enirante Bagdadon."

Bush: "Laŭ mi tiu solvo estus perfekta. Mi ne volas militon. Mi scias kio militoj estas. Mi konas la detruon kaj la morton kiujn ili kunportas. Mi estas tiu kiu devas konsoli la patrinojn kaj la vidvinojn de la mortintoj. Kompreneble, laŭ ni tiu ĉi estus la plej bona solvo. Krome, ĝi permesus al ni ŝpari 50 miliardojn da dolaroj".

Aznar: «Ni bezonas ke vi helpu nin ĉe nia publika opinio».

Bush: «Ni faros nian plejblon. La venontan merkredon mi parolos pri la situacio en Mez-Oriento, proponante novan pacplanon, kiun vi konas, kaj mi parolos pri amasneniigaj armoj, pri plibonigoj alportitaj de libera socio kaj mi lokos Irakan historion en pli ampleksan kuntekston. Eble tio estos utila al vi».

“La juĝo de la historio”

Aznar: «Ni estas realigantaj profundan ŝanĝon por Hispanio kaj Hispanoj. Ni estas ŝanĝantaj la politikon kiun nia lando sekvis dum la pasintaj 200 jaroj».

Bush: «Mi estas gvidata de respondeca historia sentemo, kiel vi. Kiam, post kelkaj jaroj, la Historio juĝos nin, mi ne volas ke la homoj pridemandu sin kial Bush, aŭ Aznar, aŭ Blair ne alfrontis siajn respondecojn. Sume, tio kion homoj volas estas havi la eblecon ĝui sian liberecon. Antaŭ ne longe, en Rumanio, mi memoris pri kio okazis al Ceaŭescu: sufiĉis ke virino nomis lin mensogulo por ruinigi lian subpreman sistemon. Estas la nehaltigebla povo de la libereco. Mi estas konvinkita ke mi obtenos tiun rezolucion».

Aznar: «Tio estus la plej bona afero».

Bush: “Mi mem decidis ĉi aferon alporti ĉe la Sekurecan Konsilion. Malgraŭ la malsameco de opinioj de miaj kunlaborantoj mi diris al ili, ke ni laboru kune kun niaj aliancanoj. Estus tre bona ŝanco havi duan rezolucion..”

Aznar: “Eble via optimismo estas via ununura limo, tamen tio ĉi maltrankviligas

min.”

Bush: “Mi optimismas ĉar mi certas pravi, kaj pro tio mi tute trankvile vivas. Ni gravan minacon kontraŭ paco estis devigataj alfronti. Min ege incitas la eŭropan nesensemon pri la suferadoj trudataj de Saddam Hussein al la irakanoj. Eble, ĉar li estas malhelkolora, malproksima kaj islama, multaj Eŭropanoj opinias, ke ĉio estas en ordo. Mi ne forgesos kion Solana (eksa Ĝenerala Sekretario de OTAN) iam diris al mi: “Kial la Usonanoj opinias nin, Eŭropanojn, antisemitaj kaj nekapablaj surpreni siajn respondecojn? Ĉi defenda sinteno estas terura. Mi agnosku, ke mi bonege rilatas kun Kofi Annan.”

Aznar: “Li partoprenas viajn etikajn zorgojn.”

Bush: “Ju pli la Eŭropanoj min atakas, des pli ili min fortigas ĉi tie en Usono.”

Aznar: “Ni devus akordigi ĉi vian forton kun eŭropestimo.”

Registara Oficejo, Downing Street, 23-a de julio 2002: Resumo pri la renkontiĝo kun la ĉefministro

SEKRETA KAJ STRIKTE NEPUBLIKA - REZERVITA AL BRITA LEGANTARO

DAVID MANNING

El: Matthew Rycroft

Dato: 23-a de julio 2002

S 195/02

Konigocele al: Sekretario pri Defendo, Sekretario pri Eksteraj Rilatoj, Ĝenerala Prokurestro, Sir Richard Wilson, John Scarlett, Francis Richards, CDS, Jonathan Powell, Sally Morgan, Alastair Campbell

IRAQ: RENKONTO KUN LA ĈEFMINISTRO, 23-A DE JULIO

Vi kaj la nomoj menciitaj inter la alsendatoj renkontis la Ĉefministron la 23-an de julio; la renkonto temis pri Irako.

Tiu ĉi dosiero estas tre grava. Endas ne elkrei pliajn kopiojn. Ĝi haveblas nur al tiuj, kiuj nepre bezonas akiri ĝian enhavon.

John Scarlett resumis la dosierojn provizitajn de la sekretaj servoj kaj la lastajn pritaksojn de JIC. La reĝimo de Saddam estis malplaĉa kaj baziĝis sur teroro. La nura maniero por finigi ĝin estis milita interveno. Saddam zorgis pri tio kaj antaŭvidis tion, sed ne kredis, ke ĝi povus esti tiom rapida kaj pova. La reĝimestroj opiniis, ke la najbaraj landoj alianciĝus kun Usono. Saddam konsciis, ke la psika bonfarto de la militistaro estis malalta, kiel ĉiam. Subteno inter la loĝantaro estis tre malgranda.

Li resumis siajn lastatempajn kunvenojn en Vaŝingtono. Sentebla sinten-ŝanĝiĝo estis okazinta. Nun oni taksis militan intervenon neevitebla. Bush deziris ekzigi Saddam, milite, uzante la ligan inter terorismo kaj amasdetruaj armiloj (ADA) kiel pravigon. Tamen, la informoj provizitaj de la sekretaj servoj kaj la okazantaj eventoj estis alĝustigitaj al la elektita sinteno. NSC sufiĉe skeptikis pri la UN-plano, kaj kompreninde ne entuziasmis pri publikigo de siaj informoj pri la iraka reĝimo. Tuj post la eko de la militaj agadoj, diskutoj en Vaŝingtono tre malpliĝis.

CDS diris, ke la atakoplanistoj pretigos raporton por CENTCOM la 1-an kaj la 2-an de aŭgusto, Rumsfeld la 3-an kaj Bush la 4-an.

La du ĉefaj eblecoj por Usono estis:

(a) Instigita komenco. Malrapida arigo de 250.000 usonaj militistoj, mallonga peraviadila atakaro (72 horoj), kaj tiam eniro en Bagdadon el la sudo. Entute 90 tagoj (30 da pretigado kaj 60 da dispono en Kuvajto).

(b) Nepretigita komenco. Eksploatado de la jamsurloka militistaro (3x6000), daŭraj aviadilaj atakoj, pravigitaj per iraka casus belli. Entuta daŭro de 60 tagoj, kun antaŭa komenco de la aviadila atakaro. Riska ebleco.

(c) Por Usono, la Unuiĝinta Reĝlando kaj Kuvajto ludis kernan rolon, danke al siaj bazoj en Diego Garcia kaj Kipro, por ambaŭ eblecoj. Ankaŭ Turkio kaj la aliaj Golfolandoj estis gravaj, sed ne esencaj. La tri eblecoj pri envolvigo de Britio estis:

(i) Baziĝi en Diego Garcia kaj Kipro, krom tri teamoj da SF.

(ii) Kiel supre, sed ankaŭ per ŝipoj kaj aviadiloj.

(iii) Kiel supre, sed ankaŭ per 40mil militistoj, eble kun nekerna rolo en la nordo de Irako, enirante el Turkio, por okupi du irakajn militgrupojn.

La Sekretario pri Defendo asertis, ke Usono jam estis komencinta "minimumajn agadojn" por sentigi premon al la reĝimo. Neniu decido ankoraŭ estis alprenita, sed li taksis, ke la plej verŝajna limdato por komenci la atakon estis januaro, 30 tagoj antaŭ la balotadoj por la Kongreso. La Sekretario pri Eksterlandaj Aferoj diris, ke li parolos kun Colin Powell ĉi-semajne. Ŝajnis nun klare ke Bush estis decidinta pri milita atako, eĉ se oni ankoraŭ ne estis decidinta kiam. La eblecoj estis malmultaj. Saddam ne estis minacanta la najbarajn landojn kaj liaj ADA-oj estis malpli ol tiuj de Libio, Nordkoreio aŭ Irano. Tial ni devus prilabori planon por sendi lastan averton al Saddam, tiel ke la UN-inspektistoj eliru el la lando. Tio povus ankaŭ helpi por pravigi militistan intervenon.

La Ĝenerala Prokurestro diris, ke la deziro pri reĝimŝanĝo ne pravigis el leĝa vidpunkto la militan intervenon. La eblaj juraj pravigoj estis tri: memdefendo, homarama interveno aŭ permeso de la Sekureca Konsilio de UN. La unua kaj la dua ebleco ne valoris ĉi-okaze. Baziĝi sur la Rezolucio de UNSK 105, tri jarojn aĝa, estus malfacile. La situacio povus kompreneble ŝanĝiĝi.

La Ĉefministro diris, ke interveno estus politike kaj leĝe akceptebla, se Saddam rifuzus la enirpermeson al UN-inspektistoj. Reĝimŝanĝo kaj ADA-oj estis ligitaj pro tio, ke la reĝimo produktis la armilojn. Estis pluraj strategioj por diplomacii kun Libio kaj Irano. Se la politika kunteksto tion permesus, la loĝantaro favorus ŝanĝon. La du ŝlosilpunktoj estis ĉu la militplano funkcios, kaj ĉu ni havos la politikan strategion por ebligi la militplanon.

Unue, CDS diris, ke ni ankoraŭ ne scias ĉu la batalplano de Usono estus realigebla. La militistaro plu demandadis.

Ekzemple, kiuj estus la konsekvencoj se Saddam uzus ADA-oj la unuan tagon de la invado, aŭ se Bagdado rezistus kaj naskiĝus urbomilito? Vi diris, ke Saddam povintus uzi ilin ankaŭ kontraŭ Kuvajto. Aŭ kontraŭ Israelo, aldonis la Sekretario pri Defendo.

La Sekretario pri Eksterlandaj Aferoj opiniis, ke Usono ne pludaŭrigos sian militan planon se ili ne kredus, ke sia strategio sukcesos. Ĉi-rilate, la interesoj de Usono kaj

Unuiĝinta Reĝlando kongruis. Sed el politika vidpunkto, povus esti malsamaĵoj. Malgraŭ la rezisto de la usonanoj, ni devus plu cerbumi pri la lasta averto. Saddam plu ludos kiel ruzulo kun UN.

John Scarlett opiniis, ke Saddam permesus la reeniron de la inspektistoj nur post konsciiĝo, ke la milita minaco estis efektiva.

La Sekretario pri Defendo diris ke, se la Ĉefministro volus uzi la militistaron, li devus tion decidi tre baldaŭ. Li sciigis ke multaj homoj en Usono opiniis, ke oni ne pluiru laŭ la plano pri lasta averto. Estus tre grave, ke la Ĉefministro klarigus la politikan kuntekston al Bush.

Konkludoj:

(a) Ni devus prilabori la fakton, ke la Unuiĝinta Reĝlando partoprenos ajnan militan agadon. Sed ni bezonis pli plenan bildon pri la usona plano antaŭ ol findecidi. La CDS devus diri al la usona militistaro ke ni estas cerbumantaj pri pluraj eblecoj.

(b) La Ĉefministro reprimtrakto la aferon, kiel oni elspozus la monon por pretigado de la agado.

(c) La CDS sendos al la Ĉefministro ĉiujn detalojn pri la proponita militkampanjo kaj eventualajn sugestojn de la Unuiĝinta Reĝlando antaŭ la semajnfino.

(d) La Sekretario pri Eksterlandaj Aferoj sendos ĉiujn informojn pri UN-inspektistoj al la Ĉefministro, kaj prilaboros kaŝe pri la lasta averto al Saddam.

Li ankaŭ konsilus la Ĉefministron pri la sintenoj de la tieaj landoj, ĉefe Turkio kaj la ĉefaj anoj de Eŭropunio.

(e) John Scarlett sendos al la Ĉefministro detalan ĝisdatigon de la sekretaj servoj.

(f) Ni ne ignoru la juran vidpunkton: la Ĝenerala Prokurestro pritaksus la leĝan opinion de anoj de FCO/MOD.

Matthew Rycroft

Konsilanto ĉe Downing Street pri eksterlandaj aferoj

Laŭ brita memorando, Bush jam enirintis la vojon de la milito.

31-a de januaro 2003

Fare de Don Van Natta, la juna.31 gennaio 2003⁵

LONDONO - En la semajnoj antaŭ la invado de Irako, gvidita de Usono, dum Usono kaj Britio duan fojon instigis al UNO-rezolucio kiu kondamnu Irakon, la ultimato de Prezidento Bush fari ĝis klarega: senarmi ĝin aŭ estos milito.

Sed malantaŭ la scenoj, la prezidanto estis certa ke la milito estis neevitebla. Dum du-hora privata renkontiĝo en la Ovala Oficejo la 31-an de januaro 2003, Bush klare diris al la brita Ĉefministro Tony Blair ke li estis determininta invadi Irakon sen dua UNa rezolucio kaj eĉ se la internaciaj inspektoroj pri la armiloj ne estus trovintaj ne-tradiciajn armilojn. Tion ĉi rivelas malpli konfidenca noto kiu raportis pri la renkontiĝo inter la du gvidantoj, verkita de altranga konsilisto por la eksterlanda politiko de Blair kaj reviziita de *New York Times* (NYT).

En memorando kiu resumis la diskuton inter Bush, Blair kaj ses aliaj gravaj asistantoj, David Manning, la tiama ĉefa politika konsilisto pri eksterlandaj aferoj de Blair skribis: "Nia diplomatia strategio devis evolui ĉirkaŭ militista programo".

"La dato de la milita kampanjo estis alpinglita per krajono por la 10a de marto," skribis Manning, parafrazante la prezidanton. "Tiu estis la tago en kiu devis komenciĝi la bombadoj."

La marŝotabelo estis fiksita en grava momento je diplomatia vidpunkto. Kvin tagojn post la renkontiĝo Bush-Blair, estis antaŭvidita la interveno de Ŝtatestro Colin Powell ĉe UNO por prezenti la pruvojn en la manoj de USONO, ke Irako estis minacanta tutmondan sekurecon tial ke ĝi estis kaŝanta ne-tradiciajn armilojn.

Kvankam Usono kaj Britio serĉis energie atingi duan UNO-rezolucion kontraŭ Irako - kiun ili ne sukcesis akiri - la prezidanto plurfoje diradis pensi ke havi tiun rezolucion estos absolute necese.

La kvin-paĝa memorando markita kiel "alte sensebla" estis distribuita al la malmultaj konsilistoj kiuj akompanis Blair kaj ĝi ne estis diskonigita. Kelkaj eltiraĵoj el ĝi estis unuafoje eldonitaj en januaro en la libro "Lawless World" (Mondo sen leĝoj), verkita fare de brita advokato kaj de profesoro pri internacia juro Philippe Sands. Komence de februaro, Kanalo 4 estis la unua londona televida kanalo kiu elsendis kelkajn pasaĝojn de tiu dokumento.

Ekde tiam, NYT revidis la memorandon en ĝia tuteco. Dum en la tempo de la faktoj la sentoj de la amerika prezidento pri la invado estis konataj, ĉi tiu nova neeldonita materialo donas klaran bildon de la du gvidantoj tuj antaŭ la eksplodo de la milito,

⁵ Artikolo del NYT 27 marzo 2006. Disponibile online:
http://www.nytimes.com/2006/03/27/international/europe/27memo.html?_r=1

ankoraŭ treege memfidaj.

La memorando indikas ke la du gvidantoj antaŭvidis rapidan venkon kaj transiron al nova iraka registaro kiu estintus jes komplika, sed administrebla. Bush opiniis, ke estis "neprobabla iu eksplodo de batalado inter malsamaj etnaj kaj religiaj grupoj." Blair interkonsentis kun tiu ĉi juĝado.

La memorando plue montras ke la prezidento kaj la ĉefministro devintis sin rezignacii antaŭ la malelkovro de amasdetruaj armiloj en Irako. Fronte al la ebleco ne trovi ion ajn antaŭ la militatado jam preta, Bush parolis pri kelkaj vojoj por provoki la kolizion, inkluzive pri la ideo imagi plano de Usona kontrolado sub UNO-mandato kun la espero ekkaŭzi fajrerojn aŭ murdi Saddam Hussein.

Ĉi tiuj proponoj estas unufoje rivelitaj fare de la brita gazetaro pasintan monaton, sed la memorando ne klarigas ĉu ili respugulis la improvizitajn sugestojn de Bush aŭ ĉu ili estis parto de la registara plano.

Konsistaj rimarkoj

Du gravaj britaj funkciuloj konfirmis la aŭtentikecon de la memorando, sed ili rezignis paroli pri ĝi, sin apelaciante al Oficiala Sekreta Akto, kiu malpermesas la diskonigon de ĉiu ajna sekreta informo. Unu el ili, tamen, diris: "En ĉiuj kolokvoj kiuj okazis antaŭ la komenciĝo de la milito kun Irako, estas evidente ke rigardante simplan foton klikitan de certa tempo de tiu fazo, provizas nur partan vidon de la decida procezo."

Dimanĉon, la informisto de la UNO-Sekureca Konsilio, Frederick Jones, diris ke la publikaj deklaroj de la prezidento estis koheraj kun la rimarkoj faritaj private al s-ro Blair. Jones afirmis ke: "la uzo de la forto estis la lasta opcio, ni interkonsentis ke ĝi verŝajne estintus necesa kaj do sekve ni ekagis," aldonante ke: "la publika tiutempa dokumentaro, kiu enhavas multnombrajn deklarojn de la prezidento, klarigas ke la administracio daŭrigis labori por diplomacia solvo ankaŭ en 2003. Al Saddam Hussein estis donitaj ĉiuj eblecoj kunlabori, sed li elektis daŭrigi la defion, eĉ post kiam al li estis alportita unu fina ŝanco kunlabori por eviti gravajn sekvaĵojn. Niaj komunikaĵoj donitaj publike aŭ private estas perfekte koheraj. "

La memorando de januaro 2003 estas la lasta de serio de sekretaj memorandoj produktitaj de la plej fidindaj konsilistoj de Blair kiuj resumas la privatajn diskutojn inter la prezidanto kaj la ĉefministro. Alia grupo de britaj memorandoj, inter kiuj la tielnomatan Downing Street-memorando verkita en 2002, montris, ke kelkaj funkciuloj de Britujo estis maltrankvilaj pro la decido de Usono voli invadi Irakon kaj pro la fakto ke "la spiona fako kaj la faktoj estis iamaniere raportitaj cele pravigi la politikon" de la administracio de Bush kiu celis realigi la deziron ekkomenci militon.

Estas impresoj kiel la lasta memorando raportas pri la sinceraj kaj preskaŭ indiferentaj kaj malkaŝaj konversacioj inter Bush kaj Blair pri la plej seriozaj subjektoj. Je certa punkto, la du gvidantoj interŝanĝis ideojn pri la iraka registaro post la konkludita milito. La ĉefministro estus dirinta: "koncerne la estontan irakan registaron, estus tre strange se ni konfidus la landon al alia diktatoro".

Manning skribis ke "Bush konsentis. " La interŝanĝo, kiel granda parto de la citaĵoj de ĉi tiu artikolo, estis raportita neniam antaŭe.

Ĉe la renkontiĝo, Bush estis akompanita de Condoleeza Rice, tiam nacia konsilisto por la sekureco, Dan Fried, asistanto de Rice kaj Andrew Card jr, la estro de la skipo de la Blanka Domo. Krom Manning, Blair estis akompanata de aliaj spertaj asistantoj: Jonathan Powell, ĉefo de lia skipo, Matthew Rycroft, konsilisto pri la eksterlanda politiko kaj aŭtoro de la Downing Street-memorando.

Je la fino de 2003, la UNO-inspektoroj alvenis al la sesa monato de serĉado de amasdetruaj armiloj en Irako, rajtigataj de la mandato donita al ili de UNO-Rezolucio 1441, kiu antaŭvidis "gravajn konsekvencojn" se Irako ne estus memvole decidinta senarmiĝi. Gviditaj de Hans Blix, la inspektoroj raportis ke ili ricevis malgrandan kunlaboron fare de Saddam kaj ke ili ne sukcesis trovi ajnan netradician armilon.

La memorando indikas ke dum la renkontiĝo, Bush kaj Blair simplanime esprimis siajn dubojn pri la ŝancoj trovi kemiajn, biologiajn aŭ atomajn armilojn en Irako dum la venontaj semajnoj. La prezidento parolis kiel se la invado estus neevitebla. La du plue diskutis pri ebla kalendarigo por la milito, la detaloj de la milita kampanjo kaj la planoj por la sekvonta fazo je la fino de la konflikto.

La diskuto pri la provokado

Sen tro da elaborado, la memorando diras ankaŭ ke la prezidento faris tri hipotezojn por stimuli la konfronton. Tial ke estis ili unuafoje estis raportitaj nur la lastan monaton, nek la Blanka Domo, nek la brita registaro pridiskutis ilin.

En la memorando oni legas ke "Usono estis pensanta flugigi U2-esploraviadilojn super Irako, akompane de koncerna avioprotektado preta iaokaze ataki, sub UNO-mandato", atribuante la ideon al Bush. "Se Saddam estus ekpafinta kontraŭ ili, li estintus malobservanto."

Rilate al WMD, la prezidento krome dirintus "Usono povus ankaŭ ekspluati dizertinton kiu publike parolu pri la AAD (armiloj de amasa detruado) de Saddam."

Malgranda klaŭzo en la memorando poste alportas al tria ebleco, menciita de Bush, tio estas la ideo murdi Saddam Hussein. La memorando ne enhavas ajnan spuron kiel Blair respondis al tia propono.

Jones, informisto de la Konsilio pri Sekureco, ne volis fari ajnan rimarkon pri tiuj ĉi proponoj, dirante: "mi ne parolas pri la privataj diskutoj inter la du ŝtatestroj." En diversaj momentoj dum la renkontiĝo inter Bush kaj Blair, kiam oni klopodis trovi iun militkaŭzon laŭleĝan kaj akcepteblan ankaŭ fare de aliaj landoj, la streĉiteco fariĝis palpebla. La ĉefministro estus dirinta ke ĝi estis esenca por ambaŭ labori cele alveni al dua UNO-resolucio, ĉar ĝi estintus "asekuro kontraŭ ĉiu ebla neatendita evento."

Laŭ la memorando Blair diris al Bush ke "se io iras neglate koncerne la militan kampanjon aŭ se Saddam levintus siajn interesojn kiel ekbruligante la petrolajn putojn, mortigante infanojn aŭ incitante internajn disdividojn en Irako, la dua rezolucio donus al ni internacian protektadon, precipe kun la araboj."

La alproksimiĝo de la horo X

Bush konsentis kun Blair ke iliaj respektivaj landoj devis serĉi la duan rezolucion, sed li atentigis ke jam estis tempolimo. La memorando estis parafrazita tiele: "Usono faros ĉion eblan por opteni iun duan rezolucion, ni uzos la forton, eĉ la minacojn".

La dokumento pludaŭras: "sed aldonas ke en kazo de malsukceso, iu milita ekago sekvus."

La gvidantoj fiksis je tri semajnoj la maksimuman tempon ene de kiu sekurigi al si duan UNO-rezolucion, tioma estis la tempo bezonata al la generaloj de la armeo por prepari la invadon.

Resumante la deklarojn de la prezidento, la memorando diras: "verŝajne, la kampanjo daŭros kvar tagojn, dum kiuj ni trafos proksimume 1500 celojn. Tre zorgeme ni klopodu eviti senkulpajn civilulojn. Bush kredis ke la efiko de la aviada atako estus certiganta la rapidan disfalon de la reĝimo de Saddam. Konsiderante la supre menciitan ataktabelon, oni alvenus al la dua rezolucio je tre mallonga tempo kaj tio signifis tuj post la prezento de la sekvonta raporto de Blix al la Konsilio de Sekureco meze de februaro".

Blair respondis dirante ke estis klare al Usono kaj Britio ke la dua rezolucio reprezentis "la finan ŝancon por Saddam." La memorando citas Blair kiu diras: "Ni estis tre paciencaj. Nun estas la tempo diri ke la krizo devas esti solvata ene de malmultaj semajnoj, ne monatoj".

La memorando diras: "Bush konsentis. Li diris ke ne estis vera la aserto ke li ĝismorte emis iniciati militon, sed oni ne povis permesi al Saddam mensogadi. Je iu certa punkto, eble post kiam ni estos akirintaj la duan rezolucion - se ni akiros ĝin - ni avertas Saddam ke li havas unu semajnon por foriri. Ni informas ankaŭ la gazetaron. Kaj do ni havas la liberan kampon se Saddam rifuzos lasi".

Bush dediĉis grandan parton de la renkontiĝo por difini la militan strategion. La prezidento diris ke la aviada atakkampanjo "forprenos la komandon kaj la kontrolon al Saddam tre rapide."

Li aldonis ke li atendas ke la iraka armeo "samrapide retiriĝos. "Li ankaŭ plue diris al la ĉefministro ke la Respublikana Gardistaro "estos ekstermita fare de la bombado."

Malgraŭ la optimismo, Bush sin diris konscia ke estis "necertecoj kaj riskoj." La memorando daŭrigas: "koncerne la detruon de la petrolaj putoj, Usono estas bone ekipita rapide ripari ilin, eĉ se ĉi tiu operacio devus esti pli facila en la suda parto de la lando ol en la nordo".

La du gvidantoj parolis nelonge pri la iraka registaro deposed Hussein. "La ĉefministro faris demandojn pri la antaŭvidita plano por post la fino de la milito." Condoleeza Rice diris ke estis survoje multe da laboro.

Koncerne la Dipartimento pri Defendo, la memorando diras, "iu ĉelo en D.O.D. estis ekzamenanta ĉiujn aspektojn kaj ĝi estus enviciĝinta en Irako por direkti la operaciojn tuj kiam la milita atako finiĝos. Bush diris ke estis preparita detala plano por certigi manĝaĵon kaj medikamentojn al la iraka popolo. "

La programo deposed la milito

Poste la du gvidantoj traktis la postmilitan tempon, imagante la transiron el la reĝimo de Saddam al nova registaro. Tuj post la fino de la milito, Bush antaŭvidis militan okupon dum nedefinita periodo. La prezidanto parolis pri la "dilemo administri la transicion al civila administracio".

La memorando finiĝas pere de Manning kiu ankoraŭ konservas la plej lastan esperon ke la inspektoroj trovu la AMD aŭ eĉ ke Saddam estos memvole lasinta Irakon. Manning skribis ke li maltrankviliĝis ke tio ĉi ne povintus okazi pro la militotabelo de Bush.

Li skribis: "Tio ĉi streĉe limigos la tempojn. Do necesas resti proksime al Blix, ni devas fari ĉion kio eblas al ni por helpi al la inspektoroj eltrovi ion iomete signifan kaj labori streĉe kun aliaj membroj de la Konsilio pri Sekureco por ke ili akceptu la kazon de ne-kooperado. Tiele kiam ni bezonos ĝin ni povos obteni la necesajn naŭ minimumajn voĉdonojn, verŝajne fine de februaro."

En gazetara konferenco en la Blanka Domo, plue sekvita de kunsido je malfermaj pordoj, Bush kaj Blair diris ke "la krizo" devas esti solvita rapide. "Saddam Hussein ne estas senarmiĝanta, "diris la prezidento al la ĵurnalistoj. "Li estas danĝero por la mondo. Li devas senarmiĝi. Estas pro tio ĉi ke mi konstante asertas ke - kaj kun mi la mia ĉefministro – la afero rilatas al kelkaj semajnoj, ne monatoj".

Malgraŭ la intensa lobiado efektivigita de Usono kaj Britio, la dua rezolucio neniam venis. La invadon de Irako gvidita de USONO okazis la 19-an de marto 2003, naŭ tagojn post la dato fiksita de Prezidento Bush en tiu tago de fina januaro en la Blanka Domo.

Artikoloj pri la Kunveno de la 1a de Marto de la Araba Ligo

La 1a marto 2003 dum la renkontiĝo de la Araba Ligo en Sharm el Sheik, la prezidanto de la Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj, la ŝejko Zayed al-Nahyan, devintus paroli kun sia kolegaro pri la akcepto de Saddam Hussein iri en ekzilon, interŝanĝe de amnestio kaj protekto. La reprezentantoj de UAE jam antaŭe renkontis Saddam-on en 4 okazoj. Li konsideris serioze ĉi tiun opurtunon, sed li postulis ke estu direkte la Araba Ligo fari la oferton pri la ekzilo, antaŭ ol li sin engaĝigis al la akcepto. Tiun-ĉi proponon oni neniam pridiskutis ĉar Geddafi fiaskigis la renkontiĝon akuzante la saudia Reĝo subaĉeti sin al USONO, bojkotante la eblecon por la Araba Ligo prezenti formale la proponon.

BBC News - Publika kvereleto fiaskigas la araba kunveno.

La renkontiĝon inter la arabaj estroj pri la Irako dominis interŝanĝo de insultoj inter la libia kaj saudia estroj.⁶

1 marto 2003

La suvereno de Saudi-Arabio, la princo Abdullah Bin Abdel Aziz, forlasis la kunvenon post la riproĉo de la libia kolonelo Geddafi, por sia demando de protekto al la USONO dum la Golfa Milito en 1991.

Dum daurigas la preparadon de ebla milita atako gvidita de la USONO, la arabaj estroj kunvenis en Sharm el-Sheik en Egiptujo, klopodante atingi komunan pozicio pri la Iraka krizo.

La regiono dividiĝis inter tiuj, kiuj subtenas militan agon por devigi Saddam Hussein-on al senarmigo, kaj tiuj, kiuj kontraŭas tiun-ĉi militan agon.

La fina deklaro de la kunveno "tute malaprobas ĉiun ajn atakon kontraŭ Irako", malgraŭ la ceesto de USONAJ militaj trupoj sur la teritorio de pluraj arabaj landoj.

Sabato, la UEA estis la unua araba lando peti oficiale al Saddam iri en ekzilon por eviti la militon, sed la irakaj reprezentantoj kiuj ĉeestis al la kunveno nepre refuzis la proponon.

Alianco kun la diablo.

La interŝanĝo de akuzoj, rekte televide elsendita en la tuta regiono, komencis kiam la Kolonelo Geddafi ekis sian paroladon. Geddafi akuzis la saudian reĝon Fahd voli "sin aliancigi kun la diablo" kiam la Usono deplojigis sian soldataron en la tuta regiono por protekti la regolandon post la Iraka invado en Kuwait en 1990.

⁶ havebla en reto: http://news.bbc.co.uk/2/hi/middle_east/2811403.stm

La princo Abdullah lin interrompis dirante tiel: "Saudi-arabio ne estas serva agento de la kolonialistoj".

"Kiu donis al vi vian povon?" demanis tiam la Libia estro.

"Vi estas mensogulo, kaj la tombo vin atendas!" li diris, antaŭ ol la Egipta televido interrompis la elsendon.

La delegitoj diris ke Geddafis refuzis retiri la akuzojn direktitajn al la Princo Abdullah, kaŭzante lia tuja foriro.

La Kunvenon oni haltigis ĉirkaŭ unu horo kaj duono, dum iom da partoprenantoj klopodis trankviligi la du homojn.

Fina deklaro.

La fina deklaro esprimas la "tuta rifuzo de ĉiun ajn atako kontraŭ Irako" kaj la peto solvi la krizon per internaci-nivelajn akordoj.

Oni instigas ĉiu Arabo "ne partopreni al neniu milita ago kontraŭ la sekureco kaj teritoria unuiĝo de ĉiuj arabaj landoj" kaj oni disponigas la "necesan tempon" al la inspektoroj por kompletigi ilian laboron.

Profunde dividitaj pri kiel alfronti la Irakan problemon, la anoj de la registaro kaj la delegitoj decidis sendi iuj reprezentantoj al Bagdado por instigi Saddam Hussein-on foriri, aŭ agi tiel ke li kunlaboru kun la inspektoroj ONU.

La arabaj landoj prenis tri malsamajn poziciojn rilate al tio.

La Golfaj ŝtatoj estas pli senkompromisaj kaj ili aliĝis al Usono por sin liberigi de Saddam Hussein.

Egiptujo kaj Saudi Arabio ĉefgvidas grupon kiu volas eviti la militon.

Sirio estas tute malfavora al ĉiu ajn milito, kiu ne havas la apogon kaj la konsenton de la Unuiĝintaj Nacioj kaj akuzas Usonon nur voli alpreni la kontrolon de la iraka petrolo.

New York Times – Araba estro asertas ke la plano de la Araba Ligo por la ekzilo de Saddam Hussein malsikcesis

2 novembro 2005⁷

de Hassan M. Fattah

Dubai, Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj. Iom da monatoj antaŭ la invado de Irako, Saddam Hussein akceptis, principe, la proponon de iri en ekzilon evitante tielmaniere la militon. Sed la plano fiaskis pro la manko de konsento inter la arabaj ĉefoj.

Tio-ĉi diris ĉi semajne iom da membroj de la registaro de la EAU.

La ŝejko Muhammad bin Zayed al-Nahyan, princo de Abu Dhabi kaj filo de la prezidanto, ŝejko Sheikh Zayed al-Nahya, diris ĉi-sabate al la tut-araba televid-kanalo Al-Arabiya ke sia patro ricevis la konsenton de Saddam Hussein, kun iom da konsideroj, al iri en ekzilon antaŭ la invado de Irako. Interŝanĝe ili postulis amnistion kaj protekton.

La deklaro de la ŝejko estis la unua aserto kiu pruvas ke Hussein estis konsideranta la eblecon forlasi la regadon laŭ la propono prezentita dum la kunveno kiu la Araba Ligo urĝe kunvokis en Sharm el Sheikh en marto 2003, antaŭ la invado.

La propono celis eviti la militon.

"Ni jam havis la finan konsenton el pluraj partoj: la ĉefaj agantoj kaj la koncernanta persono Saddam Hussein". Tion deklaris la ŝejko Muhammad al Al-Arabiya dum televid-elsendo kiu memorigis la unuan datrevenon de la forpaso de la patro. "Ni ĵus komencis determini la detalojn de la plano. Tio estus funkcionta se ni ĝin estus pridiskutinta", aldonis la ŝejko.

Membro de la registaro de EAU, kiu petis resti anonima ĉar ne rajtigita paroli pri la temo, diris ke reprezentantoj de EAU jam reknontis Hussein 4 fojojn. Hussein serioze konsideris la oportunon, sed antaŭ akcepti, li petis ke estu interkonsento ene de la Ligo.

"Saddam akceptis la ideon. principe li konsentis ĝis la lasta minuto", li diris.

La ŝejko Sheikh Abdullah bin Zayed al-Nahyan, ministro de la informacio kaj kulturo de EAU ankaŭ rivelis ke Saddam deklaris ke "li favore respondus al nia propono". La estroj de EAU ne donis iun ajn elementon kiel pruvo de ĉio ĉi kaj ili substrekis ke la kunlaboro de Hussein estis tute alie ol garantiita.

Kiam oni prezentis la planon al la Araba Ligo kunigita en urĝa kunveno, nelonge antaŭ la starto de la milito, la debato kiu naskis estis nuligita.

La Iraka delegitaro, kiu ne estis informita pri la intertraktado kiu oni estis fatanta kaŝe, primokis la propono kiu rapide estis forlasita.

⁷ Havebla en reto: http://www.nytimes.com/2005/11/02/international/middleeast/02saddam.html?_r=2&oref=slogin

La EAU asertis ke la iniciaton oni dis-sciigis sed neniam vere debatis.

"Oni ne povas skuegi tian kunvenon, per afero de tiu graveco" diris influa membro de la Araba Ligo ĉeestanta la sesion.

"La ideo eble alvenis kiam jam estis tro malfrue, aŭ eble ĝi havus pli da sukceson se ĝi estus kunigita kun pli akorda kaj harmonia kunlaboro. Sed tamen, ĉion ĉi jam apartenas al historio"

Al-Ahram Weekly – Cignokanto por araba unueco

2003 marto 6-12⁸

La 15a araba pintokonferenco, unutaga kunveno pri la iraka krizo okazinta en la egipta ruĝmara feriejo Sharm El-Sheikh pasintan semajnfino, konkludis sian laboron vokante por paca finsituacio de la krizo, starigante specialan araban komitaton por rekte interveni kun ĉiuj flankoj.

Dum la arabaj reprezentantoj ĉe la pintokonferenco en Sharm El-Sheikh ŝajnis paroli malsamajn lingvojn, la regiono eble jam trairas profundajn ŝanĝojn eĉ antaŭ ol komenciĝos la milito kontraŭ Irako, skribas Amira Howeidy.

“Gadafi faris!” Li ĵetis la aferon en iliajn vizaĝojn kaj instruis al ili lecionon!” vokis la juna viro kiu laboras en bazaro en Sharm El-Sheikh dum li hastis al najbara ejo por sciigi la novaĵon al siaj amikoj. La posttagmezan kvieton en la populara marstrata promenejo rompis ne nur la nuna laŭto de la televido, sed la ekscito kiu plenis la aeron dum disvastiĝis la novaĵo. Libia prezidanto Muammar Gaddafi kaj saŭdarabia kronprinco Abdullah Bin Abdel-Aziz estis ĵus en kverelo, kaj tion rekte dissendadis la televido.

Kiam alvenis lia vico prelegi ĉe la 15a Araba Pintokonferenco pasintan sabaton en la apudmara ruĝmara feriejo, la libia gvidanto proponis politikan analizon de la iraka krizo. Li diris, ke post la iraka invado de Kuvajto en 1990 li vokis saŭdarabian reĝon Fahd por demandi pri informoj kiujn li ricevis pri usonaj militfortoj kiu ŝutiĝas en la reĝandon. La reĝo, laŭ Gaddafi, diris: “Usono estas granda lando, kaj se ĝi eniras, kiu povas tion haltigi?”

Pludetaligante pri la maniero en kiu la golfoŝtatoj, timemaj pri la sekvoj de islama revolucio en Irano, subtenata de Saddam en sia milito kontraŭ tiu lando, kaj kiel pli poste estante minacataj de Saddam, ili invitis la usonanojn protekti siajn interesojn, li daŭrigis por diri: “Usono estas sindediĉa por protekti tiun ĉi regionon ĉar tiu regiono estas tre grava fonto de energio”.

En tiu momento Gaddafi estis interrompita de kolera Princo Abdullah, kiu svingis sian montrofron, dirante: “Saŭdarabio estas islama araba lando, ne agento de imperiismo kiel vi kaj aliaj. Kiu alportis vin al la potenco? Ne parolu pri aferoj en kiuj vi havas nenian bonŝancon aŭ bonsorton”.

La ŝokitaj vizaĝoj de aliaj arabaj gvidantoj klare kontrastis kun la ridgrimaco de Gaddafi, sed la rekta teledissendo estis en tiu momento detranĉita, lasante al la spektantoj de la pintokonferenco en la apuda ĵurnalista centro ĉe la promenejo mirŝokitaj.

Pli poste, partoj de la cenzurita filmiĝo estis dissenditaj per diversaj arabaj satelitaj kanaloj, kie Gaddafi estis vidata respondi al la saŭdarabia kronprinco, dirante: “Se ne

⁸ Havebla rete: <http://weekly.ahram.org.eg/2003/628/fo3.htm>

estus pro la golfolandoj ne estus tie nun usonaj militfortoj – la problemo estas arab-araba, ne irak-araba”.

La kverelo, kiu intensiĝis ĝis dipomatia krizo, en kiu la delegacioj kaj de Saŭdarabio kaj Libio minacis retiriĝi de la pintokonferenco, plivastiĝis ĝis la libiaj stratoj, kie vespere miloj eliris por kontraŭ-saŭdarabiaj manifestacioj. Du tagojn poste Libio revokis sian ambasadoron en Riyadh kaj sekvis tiun movon per sentima anonco pri retiriĝo –ankontraŭfoje – de la Araba Ligo.

La libia gvidanto, kiu restis en Kairo ĝis Al-Ahram Weekly presis la artikolon, mardon intervjuiĝis ĉe la ŝtate posedata egipta televido, dirante, ke se Usono militos kontraŭ Irako ĝi finfine “pereos, sed antaŭ ol okazos tio, la agentoj de imperiismo [en la araba mondo] unue pereos”.

Juĝante laŭ la rezolucioj de la pintokonferenco, la araboj ŝajnas esti unuecaj, sed en nur unu afero: “malakceptante militon kontraŭ Irako aŭ iu ajn alia araba lando”. Sed tie ŝajne finiĝis tiu unueco. Ĝi ne nur la iniciato de UAE – subtenata de Kuvajto kaj Saŭdarabio, kaj pli poste de la kunveno de Gulf Co-operation Council (GCC) [Golfaj Kunlabora Konsilio] en la lundo – malkaŝis la breĉon inter la golfolandoj kaj la cetero de la araba mondo en traktado de la iraka krizo, sed ĝi ankaŭ inaŭguris novan araban paroladon kiu evoluis dum iom da tempo.

Tiu nova golfaj parolado ne senhezite anoncas siajn interesojn kaj politikaj strategiojn rilate al la iraka krizo aŭ ĝiaj rilatoj kun Usono. La imponaj televidaj novaĵkanaloj de Gulf TV kiuj starigis precedencojn en la profesiaj normoj de raportado kaj libera parolo en la regiono, kiel Al Jazeera, MBC aŭ la lastatempe lanĉita Al-Arabia, gvidadas kaj formas araban publikan opinion. Aliflanke, tiuj kiuj adoptas pli ba’th-naciisman kontraŭusonon parolado, ŝajnas elstari kiel ‘senkompromisuloj’.

La saŭdarabia-libio interbruado estas do indiko de la hodiaŭa araba politiko, en kiu Gaddafi kaj Abdullah reprezentas du ekstremajn polusojn. Inter Saŭdarabio staras Kuvajto, Kataro kaj UAE kaj Bahrejno. “Jam for estas la epoko de komplimentoj” tekstis lundon ĉeflinio de la saŭdarabia financata kaj london-bazita gazeto Al-Sharq Al-Awsat, aludante al tio kio estis priskribita kiel la “elĉerpitaj sloganoj” de Gaddafi.

Por la golfolandoj, kiuj gastigas ĉirkaŭ 200 000 usonaj kaj britaj trupoj kaj kompleksan militservan ekipaĵon, adopti pragmatikan “realisman” aliron al la iraka krizo kaj la militserva ĉeesto en la regiono signifas alpreni “kuraĝajn” poziciojn, kiel la polemika propono elpeli Saddam.

Kvankam neniu araba lando staras malantaŭ Gaddafi, kies parolo gajnis aplaŭdon nur de la egipta strato, lia reĝimo lokiĝas en la kategorio de la restantaj ba’th-iste dominataj landoj kiaj Sirio kaj Jemeno, kaj kompreneble Irako. La parolado de tiuj landoj estas kontraŭ-usona, tutarabia kaj naciisma, proponante neniam praktikajn solvojn.

Al multaj observantoj, la mizera prelego de siria prezidento Bashar Al-Assad ĉe la pintokonferenco estas perfekta ilustraĵo de tiu parolado. La juna prezidento kiu transprenis post la morto de sia patro Hafez Al-Assad antaŭ tri jaroj proponis ankoraŭ

pluan analizon de la situacio, kiu estis pli-malpli laŭ tiu de Gaddafi, eĉ se pli eleganta.

Emfazante, ke li ne foriras de pli “emocia” aŭ “romantika” pozicio, Al-Assad diris, ke Usono diziras, ke la araboj rajtigu kaj faciligu militon kontraŭ Irako. “Iuj araboj, ne eksterlandanoj, opinias, ke la problemo kuŝas kun Prezidanto Saddam aŭ la iraka reĝimo”, li argumentis. “Se tio vere estas la problemo, mi opinias, ke estas ni devo sendi delegacion por demandi al la [iraka] reĝimo sinoferi por savi la landon kaj la tutan regionon. Sed ni scias nur, ke tiu ne estas la afero. Ni ĉiuj scias kiuj maskoj estas uzitaj”.

La “maskoj” venis unue en la formo de la afero de la reveno de la inspektistoj, kaj tiam en la formo de realigo de la rezolucioj de la sekureckonsilio de UN, sekvata de la amasdetruaj armiloj, kaj tiam reĝimŝanĝo. “Tiam ili distris nin per la afero de demokratio, tiam homaj rajtoj, kaj nun ili promesas evoluigon akiritan de militado. Sed tiu estas ĉiuj usonaj maskoj por trompi la mondon”.

Sed la afero estis oleo kaj “redesegni la mapon por taŭgi por ili, kaj kompreneble Israelo”, diris Al-Assad. La afero “detruas la infrastrukturon [de Irako], kaj mi ne volas diri laboratorioj kaj raketoj ... ili volas nacion kun bela koro sed sen cerbo”.

Lia parolado – aŭ kion iuj observantoj priskribis kiel prelego – ebligis du proponojn: ke arabaj landoj kiuj gastigas usonajn trupojn kaj militbazojn sindetenu de faciligo de ajna agreso al Irako aŭ al ajna araba lando, kaj ke la komitato formita de la estantaj, estintaj kaj estontaj ĉefoj de la arabaj pintokonferencoj (Libano, Bahrejno kaj Tunizio) estu establita por pludoni la decidojn de tiu pintokonferenco al aliaj landoj kaj al Irako.

La siria prezidanto priskribis ĉiuj israelanojn kie “Ŝaronoj” kaj ripetis la vokon ke arabaj landoj bojkotu Israelon “ĝis ĝi indikas sindevigon al la paco”.

La araba pintokonferenco pluiris por adopti la du proponojn de Al-Assad, kio plaĉis al la irakanoj, kaj la strangolo de la iniciato de UAE por reĝimŝanĝo estis plua iraka venko. Kritikantoj tamen argumentis, ke iraka venko ĉe la pintokonferenco estos mallongdaŭra.

La informministro de UAE, promene en la direkton de ĉirkaŭ 500 ĵurnalistoj, kiu priraportis la pintokonferencon tuj post ĝia fermiĝo, anoncis, en perfekta usonangla lingvaĵo, ke la iniciato de lia lando estis subtenita “pruveble” de Saŭdarabio kaj Kuvajto. “Ni [ankaŭ] ricevis subtenon nepruveble de aliaj landoj, sed malbonŝance ili ne volas tion diskuti antaŭ la kamerao. Ĉiuj el la araboj konsentas, ke Saddam foriru, sed neniu havas la kuraĝon tion publike diri”, li diris.

Du tagojn pli poste, la pintokonferenco GCC en Doha subtenis la iniciaton de UAE. Ĝi estis ankaŭ proponenda ĉe la hieraŭa kunveno de Organizaĵo de la Islama Konferenco (OIC) en Doha.

Aliaj delegitoj rifuzis la rezolucion kiu malpermesas la uzon de usonaj militbazoj kaj aliaj militservaj rimedoj en milito kontraŭ Irako kiel nerealisma, speciale kun scio pri la dekmilojn da usonaj kaj britaj trupoj kiuj nun kvazaŭ okupas la golfan regionon.

Tamen la plimulto de la arabaj gvidantoj, kaptitaj inter la postuloj de Usono kaj la kolero de la propraj homoj, ne povus ne en tiu stadio servi la senkompromisuloj. “Ĉiuj el la arabaj landoj deziras eviti malamikigi Usonon kaj eĉ Kuvajton”, diris Hassan Nafaa, ĉefo de la Fakoj de Politika Scienco ĉe la Universitato de Kairo, kiu ĉeestis la pintokonferencon. “Egiptio ekzemple estas en tre malfacila pozicio. Ĝi provas malpliki la breĉon inter la oficiala pozicio kaj popolsentoj”.

Du tagojn antaŭ la pintokonferenco la egipta registaro permesis ke okazu la unua amasskala kontraŭmilita manifestacio en la stadiono de Kairo. Tion farante, laŭ observantoj, ili helpis al homoj esprimi iujn en siaj ĉagrenoj, kaj ankaŭ sendis mesaĝon al Usono ke ĝi malpliigu la premon, por ke aferoj ne fariĝu neregeblaj. Samtempe, Egiptio ne prenas flankon kun aŭ la senkompromisuloj aŭ la por-usona golfa pozicio.

Ironie, laŭ Mahfouz El-Ansari, ĉefo de la ŝtate posedata Middle East News Agency (MENA), “eĉ la ‘senkompromisuloj proponas ĉian eblan helpon al la usonanoj, sed ili ne povas tion diri al siaj homoj”.

Malgraŭ la diversaj lingvoj parolataj de la arabaj gvidantoj ĉe la pintokonferenco de Sharm el-Sheikh, klara mesaĝo atingis la ordinarulon ekstere. Por Omar, kiu laboras en la kafejo de la hotelo Sheraton en Sharm El-Sheikh, kiu gastigis la kunvenon de la arabaj eksterlandaj ministroj antaŭ la pintokonferenco, “kion ajn ili diras, mi dubas, ĉu la araboj iam ajn proponos konkretajn solvojn”.

ABC – Colin Powell pri Irako, Raso kaj Uragana Helpo (elĉerpaĵoj)

Antaŭa Ministro elparolas pri esti lojala – kaj malpravi

Septembro 8, 2005⁹

Falsigi argumenton por la iraka milito estis ‘makulo’ provebla

Kiam Powell forlasis la reĝimon de Bush en januaro 2005, estis ĝenerale supozite, ke li malkonsentis kun defendministro Donald Rumsfeld kaj vicprezidanto Dick Cheney pri decidoj de eksterlanda politiko.

Estis Powell kiu diris al Unuiĝintaj Nacioj kaj la mondo, ke Saddam Hussein havas amasdetruajn armilojn, kaj ke li prezentis tujan minacon. Li diris al Walters, ke li sentas sin “terura” pri la asertoj kiujn li faris en tiu nun fifama alparolo – asertoj kiuj pli poste evidentiĝis malveraj.

Demandita ĉu li sentas, ke tio malheligis lian reputacion li diris, “Kompreneble ĝi faros. ĝi estas makulo. Mi estas tiu kiu prezentis ĝin en la nomo de Usono al la mondo, kaj tio ĉiam estos parto de mia reputacio. Estos dolorige. Estas nun dolorige”.

[...]

Dum Powell fine subtenis la decidon de la prezidento invadi Irakon, li agnoskas, ke li estis hezitema pri militado. “Mi ĉiam estas malvolonta militanto. Kaj mi ne bedaŭras la servoperiodon, mi admiras la servoperiodon, sed kiam la prezidento decidis, ke estas netolereble por lia reĝimo resti en atenco de ĉiuj el tiuj rezolucioj de UN, mi estas en tio rekte malantaŭ li pri la uzo de forto”, li diris.

Powell diris al Walters, ke li estas nekonsternita de kritiko, kaj ke li metas lojalecon super gvidadon. “Lojaleco estas trajto kiun mi estimas, kaj, jes, mi estas lojala. Kaj estas iuj kiuj diras, ‘Nu, vi ne devintus subteni ĝin. Vi devintus demisii’. Sed mi ĝojas, ke Saddam Hussein estas for. Mi ĝojas, ke la reĝimo estas for”, li diris.

[...]

Powell agnoskis, ke li vidis nenian pruvaĵon pri ligo inter Saddam Hussein kaj la teroristaj atakoj de 9-11. “Mi neniam vidis ligan. Mi ne povas pensi alie, ĉar mi neniam vidis pruvaĵon por sugesti, ke ekzistis”, li diris al Walters.

⁹ Havebla rete: <http://abcnews.go.com/2020/Politics/story?id=1105979&page=1>

Enketo de BBC – Ĉu ekzilo de Saddam evitus militon?

Marto 5, 2003¹⁰

Unuiĝintaj Arabaj Emiratoj (UAE) faris la unua oficialan vokon ke Saddam Hussein eniru ekzilon en provo eviti uson-gvidatan militon.

UAE submetis la proponon en letero la la kriza pintokonferenco pri Irako okazigata de la arabaj gvidantoj en Egiptio.

La planoj proponas, ke Saddam Hussein kaj la cetero de la iraka gvidantaro forlasu sian landon ene de 14 tagoj interŝanĝe de imuneco jura persekutado.

Irako tiam estus metita sub la regon de Unuiĝintaj Nacioj kaj la Araba Ligo.

Rezultoj:

Jes – 53,56%

Ne – 46,44%

¹⁰ Havebla rete:

[http://newsvote.bbc.co.uk/2/hi/talking_point/2811087.stm?
dynamic_vote=ON#vote_tp_saddam_exile_03_03_03](http://newsvote.bbc.co.uk/2/hi/talking_point/2811087.stm?dynamic_vote=ON#vote_tp_saddam_exile_03_03_03)